

Januaro 2000

Karaj geamikoj,  
mi deziras Cxion Bonan por la Nova Jaro al vi kiel AVE-membro aux interesulo. Mi ja scias ke en kelkaj landoj la Nova Jaro komencigxas je alia tago kaj povas havi alian numeron ol 2000.

La jarfina tempo estas sakra por cxuij - almenaŭ je la norda parto de nia tero. Finfine la tagoj igxas pli longaj kaj oni revas pri paco kaj sukceso. En multaj landoj mankas la paco, homoj estas subpremataj - ofte temas pri interetna malpaco:

Okupacio de la indigxena regiono fare de koloniisma imperio; subpremo aux envio de

pli sukcesa etno - parte videbla en diversaj eklezioj aux religioj, kiel ekz-e en

Islamo: sunna-anoj kontraux sxia-anoj. Felicxe en Norda Irlando post jardekoj katolikoj pacigis kun la protestantoj; kaj en Orienta Timoro la okupacio fare de Indonezio finigxis.

Tamen restas multaj malbonaj ekzemploj kaj la tempo de kolonialismo ankoraux ne finigxis (ekz-e Rusio kaj Cxinio apartenas ankoraux al la kolonialismaj landoj). Mi esperas, ke en la Nova Jarmilo la maljustaj, kruelaj rilatoj inter la homoj kaj

inter la homaro kaj la naturo ne akriĝas - sed plibonigxas, dank' al tehnikaj progresoj.

> Statistiko de AVE:

AVE havas 246 regulaj membroj kaj 130 interesatoj. Se Vi havas demandojn rilate AVE,

bv. respondi al tiu cxi mesagxo.

AVE mem ne estas Verda Partio sed informa reto de Verduloj; ni estas partianoj kaj

ne-partianoj, kiuj akceptis la celojn de AVE kaj la Politikajn Gvid-liniojn de la

Euxropa Federacio de Verdaj Partioj (EFGP), publikigitaj en Masala/Helsinki en 1994.

-----

> Fiksdatoj / Kalendaro - Invitoj:

2000-07-15/23 Moskvo, 73a SAT Kongreso:

AVE-Prezentado kaj diskuto pri Verda Politiko (M. Westermayer)

2000-04-27/05-01 Oostende, 4a Euxrop-Unia Kongreso:

Euxropa AVE-Renkontigxo;

partopreno je labortago (28a) en la Euxropa Parlamento en Bruselo;

vizito de ekologia bieno de Komitato Jean Pain (cxu eblos ?).

2000-07-25/08-01 Tel Aviv, 85a UK de UEA: Tutmonda AVE-Renkontigxo.

>> Kiu pretas organizi gxin (prezentado kaj diskutado) ? ?

> Kiu partoprenos en la IJK en Hong Kong ??

Mi ne partoprenos tie.

2001-04-14/16 Canberra (Australio), 1a Tutmonda Konferenco de Verdaj Partioj:

AVE

intencas prezenti Esperanton tie.

2001-07-xx: Zagreb, 86a UK.

-----> Raportoj:

> Sukceso de nia Pariza Rezolucio:

Enkadre de la Euxropa Kongreso de la Verdaj Partioj en Parizo (Cite de la Science)

1999-02-27 la Asocio de Verduloj Esperantistaj, AVE, dank' al la kunlaborantoj el

SAT, Franca Esperanto Junularo ni informis pri Esperanto kaj organizis unu el la 16

forumoj (publikigita en AVENO 20).

Kiam aperis AVENO 20 la konsilio de la EFVP, Euxropa Federacio de Verdaj Partioj (intertempe 31 partioj en 29 landoj kaj krome la pola Ekologia Forumo (en la Unio por

Libereco)), ankoraux ne decidis pri nia rezolucio. Ni ja verkis - paralele kun ERA -

rezolucio-proponon por nia celoj:

Dua Kongreso de la Euxropaj Verdaj Partioj

Parizo, Cit, de la Science, 1999-02-26/28

> Resolution relating Esperanto: (origina versio en la angla)

A:

The international language esperanto should be offered as option in european schools, as it is neutral and easy to learn. Esperanto gives easy access to understanding how languages work and is ideal to bridge the gap between the cultures.

B:

The international language esperanto shall become one of the official languages in the EP/EU-system when the principle of "language equal-rights" has to be stopped.

After the EU-enlargement this principle cannot be hold for simple technical reasons.

The neutral language esperanto will be representative of those languages who will

be not elected as official working languages in the EP/EU-system.

> Aldonita esperanto-traduko de la rezolucio:

A:

La internacia lingvo Esperanto devus esti elektebla kiel opcio en euxropaj lernejoj,

cxar gxi estas neuxtrala kaj facile lernebla. Esperanto subtenas la komprenon kiamaniere lingvoj funkcias. Gxi estas ideala ponto por superponti la interspacon

inter la kulturoj.

B:

La internacia lingvo Esperanto devus igxi unu el la oficialaj lingvoj de la EP-/EU-

sistemo kiam la principo de la "egalrajteco de la lingvoj" devas esti haltigata.

Post la EU-etendigo tiu cxi principo ne plu estas uzebla simple pro teknikaj kauxzoj. La neuxtrala lingvo Esperanto igxos la reprezentanto de tiaj lingvoj, kiuj ne

estos elektataj kiel oficialaj labor-lingvoj en la EP-/ EU-sistemo.

Subskribis: Victor Cavaco (PT), Solange Fernex (FR), Natalie Kirvalidse (GE), Daniel

Jositsch, (CH), Marton Vargha (HU).

Krom AVE ankaux ERA proponis similan rezolucion (pli formalan) kaj kolektis la necesajn subskribojn - de aliaj subskribantoj; ekz-e el Irlando. La komitato de la

EVFP kunmetis ambaux rezoluciojn kaj decidis interrete. Fine de septembro 1999

la konsilio de la EFVP kunsidis en Bratislava. Martin Minich kaj lia kolego reprezentis tie AVE-n por informi kaj eble defendi nian rezolucion. Sed ne necesis defendi gxin - do, nia rezolucio estas akceptita de la EFVP !

-----

>> AVE-Renkontigxo kaj Seminario  
> Okaze de la 84a UK en Berlino okazis la regula AVE-Renkontigxo: Partoprenis pli ol 40 personoj. Krom mia prezento de AVE kaj respondo al kelkaj demandoj parolis Krayg Meulen pri la projekto "Sunfloroj", helpi al rifugxintaj infanoj en Kosovo ludi kaj lerni - kaj ne droni en la mizero. Julius Wasik invitis al kontraux nuklea paco-organizajxo. Krome ni informis pri AVE en la budo de la fakaj asocioj.

> Por s-ro Peng el Wuhan (CN) mi arangxis renkontigxon je la Heinrich Boell Fonduso, kie li povis diskuti ecx en la cxina kun fakistino pri ekologio kaj urboplanado en Cxinio; kaj kun Tsewang Norbu (respondeca por la publika agado), pri la politiko inter Cxinio kaj Tibeto.

> La 2-a AVE-Seminario pri Verda Politiko okazis en Jetrihxovice (Cxehxio), dekstre de la Labe-Rivero proksime de Germanio; enkadre de turisma arangxo de la saksaj esp-istoj, gvidata de Micha Wolf. Tie situas la tre vizitinda pitoreska sablosxtona rokaro. Dumtage ni migradis ekologie kaj vespere diskutis pri Verda Politiko, aparte pri la ebleco eviti nukleaj centraloj pere de pli efika uzado de energio kaj evoluo de kolektado de renovigeblaj energioj el suno kaj vento. Aliaj eventoj estis du TV-filmoj: S-ro Krziz pri la arbara regiono de norda Bohemio kaj kion faras la chehxa registaro por eviti sulfurajn elflugasojn, kiuj antauxe detruis la arbaron je la kresto de la Ercmontaro (DE) kaj Giganto-Montaro (PL). Tatjana Auderskaja prezentis ekologian ekskurson de lernantoj lauxlonge de la Dnjestro-Rivero, do sxi montris bildojn el la tuta fluo de la rivero (vidu pli sube) .

>> Agado de AVE:

> Germain Pirlot ja kolektas la nomojn de EP-anoj kiuj subtenas Esperanton. Inter ili estas 11 Verduloj (22,9 %). Ni intencas diskuti kun la Verda Grupo, uzante la akceptitan rezolucion.

> Konstanta temo estas la Aral-Mar0; vidu AVENO 17. Dank' al pli granda financa subteno por AVE ni povis donaci faklibron pri la Aral-Mar0 al Diljara, studentino de resurso-protektado norde de la Aralo. Kaj mi povis transpagi 700 gmk al la asocio Um-Welt-Film en Berlino - ili verkis filmon pri la suda regiono de Aralo; ili transpagis la monon al D-rino Oral Atanyasov en Nukus. Sxi petis min subteni sxian agadon plibonigi la san-staton (rilate anemio) de patrin0j kaj infanoj en sxia regiono.

Samtempe sxi klopodas enkonduki dauxrigeblan agrikulturon "Permakultur" por plibonigi la ekologian kaj akvo-rilatan situacion en Karakalpakio.  
-----

> Milito kaj Paco

La Kosovo Milito sxokis la tutan pacifisman movadon; cxar "oni" ne volis redukti la krizan situacion pere de moderigo fare de OSKE. Anstataux oni volis kapitulacion de

Jugoslavio (Rambouillet, aneksajxo B). Mortis 2000 homoj. Mi skribis publikan alvokon

por la tri respondecaj fortoj: NATO & Usono, Serbio kaj Albanio. Mi nur sukcesis sendi la tekston rekte al Bill Clinton - sen respondo.

Ankoraux nun (preskaux unu jaro post la komenco de la milito) regas malpaco kaj malordo en la Kosovo-Regiono; lauxdire oni nun instalas kvazaux-registaron en Kosovo.

Unu el la sekvoj estas, ke nun Rusio kvazaux "rajtas" militi same aux ecx pli kruele

kontraux la cxecxenaj auxtonomistoj. Jam mortis kelkaj miloj da homoj ambauxflanke.

La informa politiko estas plene kontrolata de Moskvo. EU kaj NATO iomete admonis Rusion; sole la rusaj civitanoj - ekz-e la patrinaj de la soldatoj - povas bremsi la

atakojn. Jam decidis la cxecxenoj fari partizanan militon.

Kial ne eblas lasi la kauxkazajn provincojn (koloniojn) en la libereco kaj trovi libervolan konsenton por unuigxo - simile al Euxropa Unio ?

Jam revenis HongKong kaj Makao al Cxinio - Gratulon !

Sed kiam revenos Tibeto kaj Xinjiang al siaj indigxenoj ? Intertempe Cxinio setligas

la han-etno en tiujn provincojn.

Ne temas cxi tie pri Tajvano, cxar gxi estis fendita de la cxeftereno pro internaj

politikaj kauxzoj. Maux Dse Dong liberigis Cxinion; sed ne eblis instali komunismon.

Nuntempe pli aux malpli la nomo restis, dum efektive furoras la kapitalismo. Do, versxajne iam ambaux sxtatoj unuigxos en formo de libervola federacio.

>> Komuna Ekstera kaj Sekureco Politiko (KESP) de la Euxropa Unio

Mi (M.W.) sendis la sekvan tekston 1999-05 kiel persona opinio al Ernst Guelcher,

komisiito pri la KESP en la Verda Grupo de la Euxropa Parlamento.

0. OSKE (La Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Euxropo) devas ricevi pli da financaj rimedoj kaj gxi estu cxiam la unua opcio en iu ajn politika konflikto. La trejnado en la moderigo de konfliktoj devas esti pli intensa.

1. NATO estas dominata de Usono; la intereso de Euxropo ofte diferas de tiu de Usono.

2. Se Euxropa Unio volas igxi reala partnero rilate euxropaj decidoj, gxi unue devas havi propraj respondecoj rilate la armeo(j).

3. La demokratiigo de EU devas esti plene establita. Necesas politika kontrolo de la EU-armeoj (nuntempe sub la nomo de OEU, Okcident-Euxropa Unio, fondita 1954.

4. La reguloj de la EU-armeoj devas esti klaraj kaj gxisfunde diskutitaj.

4a. Unuflanke por respondeco ene de EU-regiono.

4b. Aliflanke por respondeco ekster la EU-regiono.  
4c. Antauxaj kolonioj de EU-landoj, ekz-e Reunion (ktp.), pripensitaj kiel ekster-EU.

5. La soldatoj devas esti ekzamenitaj, cxu ili subtenas la Homajn Rajtojn.

6. La EU-armeoj devas esti armitaj por defendo, ne por agreso.

6a. Neniu nukleaj armiloj, neniu DU-obusoj (DU= malricxigita (je radioaktiva isotopo) uranio).

6b. Neniu kontraux-personaj minoj.

-----

>> Informa Fako de AVE

AVE-anoj tradukis tekstojn pri la Ekologia Imposto kaj

pri la Paco-Politiko de la Verda Grupo en la Euxropa Parlamento.

Mi verkis opinion pri la Komuna Ekstera kaj Sekureca Politiko de la Euxropa Unio; gxi

estis demandita de la Verda Grupo en la EP.

Mi sxatus diskuti gxin kun vi. Ili estas haveblaj elektronike aux papere.

>> Persona Raporto el Odeso (Ukrainio): Mi estis invitita partopreni la Kongreson pri

Spektroskopio de la Ukraina Akademio de Sciencoj. Unu mi vizitis Lutsk.

En Kowel Ljudmila atendis min frumatene; survoje al Lutsk ni parte vizitis la muzeon

por Lessja Ukrainka en Kolodjajxne. L.U. estas poetino, kiu evoluis la ukrainian lingvon "La kanto de la arbaro". Alitage mi rajtis viziti la universitatan muzeon por

L.U. En la antikva kastelo-muro ni vizitis la muzeon de sonoriloj el diversaj historiaj lokoj (ekz-e koncentrejoj).

> En Odessa Tatjana Auxderskaja gvidis min. Mi vizitis sxian junularan klubon "Verda

Stelo". Ni diskutis pri sxia traduko de lernolibro pri "Teoria Ekologio". Mi vizitis

la Milito-Muzeo; cxar Odeso estis okupita longe de la Nazioj el Rumanio kaj Germanio.

Dank' al la katakomboj, la civitanoj povis kontrauxstari longe.

Dank' al Tanja ni vizitis la oficejon de MAMA'86, NRO kiu fondigxis post la Cxernobyl-a katastrofo, por subteni patrinojn kaj infanojn, kiuj pleje estas endangxerigataj. Nun ili cxefe okupigxas pri la kvalito de la aero kaj trink-akvo.

La aero dank' al la apud-mara situo estas ne tro malbone, tamen en la norda industria

parto estas elflugasoj de kablo-industrio. "Oni" forbrulas rubajxon en malfermitaj

ujegoj cxie ajn, ecx je la plagxo. Mal-dank' al la plastikajxoj tiu bruligado faras

fulgan fumon kaj venenigas la aeron ekz-e pere de dioksinoj, mi supozas. La trafiko

estas tre densa - la tramo estas malnova. Se oni devas veturi trans Odeso, necesas

sxangxi je la stacidomo kaj pagi denove (ne je monata bileto). Krome oni cxiam pagas

por busoj. Bedauxrinde mankas biciklo-vojoj !

Dank' al Valentin Jankovsky, membro de la Verda Partio, (iu simpatianto (??))

veturigis nin al la Dnjestro-rivero. Tie situas la laboratorio de la Odessa Hidrometeorologia Instituto, kie laboras Vadim Gontarenko, tre engagxita por reteni la

kvaliton de la rivera akvo, kiu fluas el la kranoj en Odeso; mi trinkis gxin

kvankam  
gxi estas ne tre pura. Bonan trinkakvon oni devas porti el diversaj publikaj  
kranoj,  
kie fluas akvo el subgrundaj fontoj. Vadim tie instruas lernantojn kaj ili  
reciproke  
purigas la bordon de la rivero; cxar ankaux tie la "normalaj homoj" ne estas  
suficxe  
respektemaj rilate la naturo. Li petis min transdoni informon (el la rusa al Eo  
kaj  
de mi al la angla) al la Verda Partio en Kiev kaj en Bruselo (E. Schroedter,  
MdEP);  
li postulas, ke oni ne deprenu pli da akvo el la rivero, kiu havas 11-jaran  
ritmon en  
la akvokvanto, kaj ke oni ne faru planitajn barojn, speciale ja la apud-maraj  
lagoj,  
kiu intersxangxas fresxan akvon. Alie la rivera akvo putrigxus !  
-----

>> Informoj el la tuta mondo - Pozitive:

> Auxtomobiloj / Fuelo / Eko-impostoj:

La paradigmo ke granda privata auxtomobilo montras la bonan kvaliton, ricxecon,  
ktp.

de la sxoforo pli kaj pli paligxas. Unu el tiuj kauxzoj estas la enkonduko de la  
ekoimpostoj, kiuj ne nur altigas la kostojn por la fuelo, sed ankaux montras la  
gxeneralan malakcepton de alta forkonsumo je fuelo. Do, sendependaj konstruistoj  
-

ekz-e incititaj de VerdPaco (GreenPeace) kaj ankaux la auxto-industrio produktis  
plurajn tipojn de auxtoj kiuj konsumas inter 3 kaj 4 l da fuelo je 100 km.

Krome - dank' al la unuanimeco de la OPEC-landoj - la prezo por teroleo  
duobligxis

dum unu jaro. Same kiel la ekologia imposto gxi direktas al pli efika uzado.

> Cxinio nun enkondukis legxon por savi siajn arbarojn. Mi vidis bonan filmon de  
cxina media NRO, subtenita de la registaro. Oni plantas zonon de arbaroj por  
bremsi

la dezertigon. Alia kauxzo estas la valora retenado de pluvakvo kaj la grundo;  
kaj

tiel reduktas la inundo-riskon.

>> Informoj el la tuta mondo - Negative:

> Rusio / Cxinio: Cxinaj entreprenoj ekz-e el Harbin forhakas arbarojn en la  
proksima

Siberio; kie la rusa registaro ne povas efike kontroli, kiu pagas kiun por kio.  
La

rusa kompanio Sibles vendas, sed ne investas la monon en dauxrigeblan  
reforstigon.

La prezoj estas tro malaltaj. Ili ankaux vendas al la paper-uzino en Baikalsk.  
(NRO Volno, <EkoNet@igc.APC.org>, Septembro 1999)

> Baikal Lago (Rusio), la plej granda resurso de trinkakvo, estas poluita de  
granda

paper-uzino en Baikalsk ekde 1966 ! Gxi ne pritraktas la rubakvon sed ellasas  
gxin

pere de rivero en la Baikalo. Jam mortis fokoj pro nekonata malsano. Laboristoj  
suferas je klor-akneo. Sulfuracido estas uzata por pritrakti la lignon. Kloro  
estas

uzata kiel paligenzo; la plej dangxera metodo. El la kamentuboj venas dioksinoj  
en la

medion pere de la fumo. NRO Volna (la ondo) subtenata i.a. de la Heinrich Boell  
Fonduso komencis almenaux esplori la aferon. (Reuters, AFP, Junio 1999).

> Belarusa sciencisto, Yuri Bandazhevsky, cxefo de la Medicina Universitato en Gomel (BY), estis arestita pro siaj avertoj.  
Li publikigis informon, ke ankoraux restas nukleaj partikloj (eretoj) el la Cxernobyl-Karastrofo (1986) en la grundo.  
La plej grava nuklea poluado okazis en la regiono de Gomel, proksime de Cx..  
Pro sia malsano - kaj pro la internaciaj protestoj - oni liberigis lin intertempe.  
(fonto: ####)

> En Kirgizio oni volas enkonduki la teknologion forbruligi la rubajxon.  
Laux la informoj la planita itala teknologio havus kiel kromefikon, ke toksaj dioksinoj kreigxas dum la procezo.  
Demando (de AVE) estas cxu temas pri Thermoselect ?  
Metodo kiu estis inventita laux necerta teknologio - kaj jam ekde 1995 (?) sub protestoj de la NRO-oj.  
La unua prototipo en Karlsruhe devus labori jam ekde septembro, sed pro teknikaj problemoj gxis nun (Januaro 2000) ne funkcias korekte.  
(<Biom@infotel.kg>, Januaro 2000)

-----  
(kompreneble ekzistas pli da ekzemploj )  
-----

>> Agado de NRO-oj (el la multaj tekstoj mi nur povis cxerpi ekz-ojn):  
> VerdPaco kaj aliaj kontrauxas la kemiajxojn kiuj efikas simile al hormonoj (POP's:  
dauxraj organikaj poluenzoj (DOP)):  
TBT (Tri-butyl-stano) kio devus protekti la sxelon de la sxipoj; krom el la sxipoj  
gxi devenas el fecxa-grundo de havenoj - cxar gxi entenas multe pli da TBT.  
PCB (Poli-klorizita-difenil) uzataj por izoli;  
bromizitaj kemiajxoj, uzitaj por protekti kontraux la ekflamo;  
PVC (poli-vinil-klorido) kiu entenas moligenzoj, ekz-e en ludiloj por beboj;  
kaj multaj pesticidoj.  
Entute tiaj DOP-oj kolektigxas en la graso de bestoj kaj homoj (ekz-e en la patrina lakto); cxefe en la arkta regionoj, cxar tie la evaporigxo estas malalta.  
Arkta ursoj igxas ambauxseksaj (hermafroditoj).

> PGA k.a. protestis en Seatlo kontraux la WTO (TMO, tutmonda merkato organizo).  
TMO  
volas redukti la barojn por industrio kaj merkato. Sed tio signifas, ke nek socialaj  
nek ekologiaj normoj estos akceptataj.

>> Bryansk Deklaracio kontraux GMO (Genetike Modifitaj Organismoj)  
Gxi estis decidita je internacia konferenco en Bryansk (RU), 1999-12-10.  
La pritraktitaj temoj estas:  
Biodiverseco, agrikulturo, suvereneco, teknologio, merkato,  
patentoj (neniuj patentoj al vivantaj organismoj !),  
respondeco (laux la principo: la poluanto devas pagi por la sekvoj).  
Adreso: Nina Holland <Nina@aseed.antenna.nl>

>> Tutmondaj Ago Tagoj 2000 (laux UN publikajxo "Go between"):  
mi elektis prefere tiujn, je kiuj vi povas iel agi mem.  
03-08 virinaj rajtoj kaj paco  
03-22 akvo  
04-20 tago de la tero  
05-25 semajno kontraux kolonialismo  
06-05 medio

06-17 batali kontraux dezertigxo kaj akvo-manko  
07-11 stabiligxo de la hom-amaso (populacio)  
08-09 indigxenoj  
10-02 logxado  
11-16 toleremo  
11-20 infanoj  
12-03 handikapuloj  
12-10 homaj rajtoj  
-----

>> Verdaj Partioj:

Ili sukcesas, kvankam oni rimarkas, ke tiuj VP kiuj kunlaboras en registaro (Francio, Germanio, Finnlando, Italio, Belgio) havas problemojn enmeti siajn programojn en la koncernen politikon de la registaro. Cxefe rilate la nuklea energio; kaj ankaux la partopreno en la Kosovo-Milito estis kontraux la pacemaj programoj. Tamen videblas ankaux pozitivaj rezultoj: instalado de la ekologia imposto por redukti la imposton kaj pensionajn kotizojn de la laborantoj. La for-uzado de nerenovigeblaj resursoj devas esti impostita por ke oni uzu ilin pli racie. Oni rekte pere de financa subteno kaj nerekte pere de pli alta prezo por oleo subtenas la investadon uzi la sunan energion kaj uzi pli efikaj metodoj. En Germanio eksterlandanoj nun pli facile povas ricevi la sxtatanecon kaj infanoj naskitaj en Germanio auxtomate ricevas la germanan - krom tiu de siaj gepatroj - tamen ili devos decidi kiam ili agxas 21 (aux 23 jaroj).

> En la Euxropa Parlamento nun sidas 38 (antauxe 27) Verduloj kaj ili havas koalicion kun kelkaj regionalistoj, do, entute estas 47 en la Verda Grupo.

> en Kiev renkontigxis la Nigra Maraj Verdaj Partioj: reprezentantoj venis el Moldavio, Rumanio, Turkio, Georgio kaj Ukrainio. Ili postulis respekti la rajton de la diversaj popoloj (Kurdoj, Cxecxenoj, Abhxazoj, en Transdnistrion). Ili protestis kontraux la Milito en Kosovo kaj nun en Cxecxenio. Krom la homa tragedio temas pri ekologia katastrofo (Danubo, nukleaj rubejoj, aero).  
> En Burkina Faso Ram Ouedraogo igxis Ministro de la Sxtato kaj Yacouba Toure igxis Media Ministro. Tamen la verda partio restis en la opozicio. (Update 5/99)

-----  
Mi bonvenigas viajn reagojn kaj informojn.  
Mi preferas simplajn ASCII-tekstojn.

> Se vi ne plu volas AVENOn, bonvolu informi min:

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)  
Sekretario: Manfred Westermayer  
Kandelstr. 62, DE-79194 GUNDELFINGEN  
e-posxto: M.Westermayer@3Landbox.comlink.apc.org  
<http://www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm>  
(aktualigota fine de februaro)  
UEA-konto: avex-z

AVE-membroj - la liguloj inter Verduloj kaj Esperantistoj  
Ni pensas tutmonde - Ni agas surloke kaj regione.